

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redaktör — redaktoro: R. PEHRSSON, 3—23,
Gävle, (Svedujo).

Ansvarig utgivare — responsa eldonanto kaj
administranto: W. WAHLUND, Gävle, (Svedujo).

N:o 8.

Augusti 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige
1:20 kr., i Norge 1:60 kr., eksterlande 1:— Sm.
(1:82 kr.).

Lösnummer 10 öre.

Annonpris — anonprezo: 5 öre pr mm.

Neŭtrala laboro dum la milito.

En Kopenhago stariĝis antaŭ kelka tempo oficejo por »Konservado de internacia kunlaboro». La iniciantoj estas »La Pac-unuiĝo», »La Nacia Konsilantaro de Danaj virinoj» kaj »La Asocio de la Virinaj Unuiĝoj, Komitato por elektraĵto».

La ideo pri starigo de tia oficejo devenas de la holanda »Kontraŭmilita Unuiĝo», al kiu jam aliĝis ĉ. 300 societoj kaj 9000 izolitaj personoj.

La kopenhaga oficejo elsendis alvokon, subskribita de 23 bonaj danaj nomoj, i. a. S-ro *H. Ostenfeld*, la episkopo de Selando, S-ro *Frederik Bajer*, honora prezidanto de la internacia pacoficejo, la universitataj profesoroj S-roj *Otto Jespersen*, *Carl Torp* kaj *Harald Westergaard*, S-ro advokato, parlamentano *Niels Petersen*, prezidanto de »Dana Pac-unuiĝo» S-ro *H. J. Hannover*, direktoro de la politeknika lernejo, S-ro *H. Voss*, prezidanto de la dana grandloĝio de I. O. G. T., S-ro *F. Baručl*, prezidanto de Societo de Danaj Esperantistoj k. t. p.

La elsendita alvoko precipe sin turnas al la danoj, memorigante al ili ke ili kiel anoj de neŭtrala ŝtato, ŝirmitaj kontraŭ la teruraĵoj de la milito, tamen ne devas indiferece rigardi la dramon, kiu estas ludata antaŭ iliaj okuloj, sed memori, ke la cirkonstancoj kreas specialajn devojn kaj taskojn, kiuj estas solveblaj nur de neŭtrala nacio.

Diversaj societoj sekve de la alvoko jam aliĝis kiel apogantoj de la oficejo; inter ili troviĝas krom la suprenomita: La Junula Pac-societo

»Pax», »Societo de Danaj Esperantistoj», »Dana Idofederacio», »Kristana Mondunuiĝo», la dana Komitato, »Kristana Pac-Unuiĝo», »Abstinenca Unuiĝo de l' Dana studenta Junularo», »Dana Grandloĝio de I. O. G. T.»

La provizora programo de la oficejo estas la jena:

I: Konservado de l' interrilato de la internaciaj organizaĵoj,

II: Prizorgo de sciigoj pri kaj serĉado de civilaj personoj dum la milito,

III: Respondo de demandoj kaj disvastigo de sciigoj pri internacia paclaboro.

La alvoko cetere preparolas la neceson de l' konservado de la internacia vivo kaj interrilatoj, sed ne dubas pri tio, ke en la militantaj landoj la laboro nur malfacile estos daŭrigata nun kaj eble dum la unuaj jaroj post la milito, tial ĝi oferas sian peron en okazoj de bezono, ne nur laŭ la supre skizita programo, sed en ĉiuj cirkonstancoj, kiuj ne kaŭzas konflikton kun la neŭtraleco de la dana ŝtato.

Ekz. multaj internaciaj movadoj havas sidejon en la militantaj landoj kaj pro tio nur malfacile interrilatas kun eksterlandaj fakoj; tial estas konsilinda al ili provizore ŝanĝi la sidejon. En tiaj okazoj la kopenhaga oficejo oferas sian helpon je la aranĝo.

Ĉar neŭtrala lando estas pli oportuna por kongresoj dum la milito kaj eble ankaŭ poste, la oficejo volonte estas peranto tiarilate.

La adreso de la oficejo estas:
Bureau for Opretholdelse af Internationalt Samarbejde,
Vester Voldgade 8, Kopenhago B.

Kiel supre montrita la »Societo de Danaj Esperantistoj» ankaŭ aliĝis kaj oferis sian helpon pere de nia lingvo.

Ni inter alie promesis pere de Esperanto konatigi la oficejon kaj ĝian celon al aliaj landoj, kaj tial ni turnas nin al niaj samideanoj en ĉiuj landoj kun la peto, ke ili represu ĉi-tiun artikolon en la Esperanto-gazetoj kaj poste traduku ĝin por publikigo en naciaj gazetoj; vi tiamaniere servas al la konservado de la internacia vivo, samtempe kiam vi faras propagandon por la internacia lingvo Esperanto.

Sendante la gazetojn, kiuj priparolas ĉi-tiun gravan entreprenon, al la oficejo, vi plej bone montras la taŭgecon de nia lingvo en internaciaj rilatoj. Ni tial petas vin kiel eble plej multe atentigi viajn samlandanojn pri la utilo, kiun ili povas havi de la neŭtrala oficejo, kiu volonte respondas al ĉiuj demandoj.

Margrete Noll.



— »Kioma horo estas, knabo mia?» demandis vojaĝanto al malgranda kamparana knabo.

— »Ĉirkaŭ la 12-a», respondis la knabo.

— »Mi supozis, ke estas pli multe.»

— »Ĝi neniam fariĝas pli multe — ne tie ĉi, respondis la knabo surprizite, »ĉar tiam ĝi rekomencas je la unua!»

Trad. S. E. Ch.



"Esperantismo."

En sia artikolo en la julia numero de »La Espero» S-ro Rosengren diras: »Ni ne senkreditigu la vorton »esperantismo» per iaj nebuloj revoj kaj fantaziaĵoj!»

Mi rekomendas al S-ro Rosengren ke li legu la paroladon de D-ro Zamenhof ĉe la Dua Kongreso en Genève. S-ro Rosengren havas planan rajton ligi kun la vorto »Esperantismo» nenian alian ideon ol »movado, kiu celas la progresigon de Esperanto kiel lingvo internacia», sed li havas nenian rajton postuli ke aliaj homoj faru la saman. Kiel diris D-ro Zamenhof en la supre citita parolado:

»Se nin, la unuaj batalantojn por Esperanto, oni devigos ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bonligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neuigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forjetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: »Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika util-eco, ni volas havi nenion komunan!»

»La sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas — — — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.»

Laŭ ĝenerala konsento inter la Esperantistaro la vorto Esperantismo enhavas tiun ĉi interesan ideon. Se tio ne plaĉas al S-ro Rosengren, li povas tute ne uzi la vorton, sed anstataŭ ĝi paroli pri la »Esperanta movado» aŭ »Esperantista movado», sed estas tute malprove diri, kiel li faris, ke »Esperantismo estas nomo nur de simpla movado por internacia lingvo».

I. W. Hipsley.

Birmingham,
Anglujo, 13^o/8 15.



"Esperantotago" en Upsala.

La 22-an de aŭgusto estis rimarkinda tago por Upsala en esperantista rilato, ĉar ne malpli ol »dudekelkaj» somerfestantaj esperantistoj

tiam vizitis la malnovan universitatan urbon ĉe Fyris.

Estis la klubo esp. de Gävle, kiu, efektivigante malnovan projekton, faris dimanĉan ekskurson tien. Pli ol dudek el la membroj partoprenis, inter aliaj s-roj Wahlund, Pehrsson, Helsing kaj Pausch (antaŭe en Borås). S-ro Helsing mendis al la honoro de la tago specialan verdan flagon, kiu la tutan tagon montris, kie la esperantistoj sin trovis. Alvenintaj al Upsala en la mateno, oni laŭ interkonsento kun la Stockholmaj esperantistoj unue atendis la alvenon de tiuj, reprezentataj de fraŭlino Josefsson kaj s-roj John Johansson — »Joĉjo» —, Adolf Larsson kaj Skog, ĉiuj malnovaj konataj esperantistoj. Ilin akompanis alia por la vizitintoj de la svedaj esperantotagoj konata samideanino, fraŭlino Asplund el Eskilstuna.

De la vagonaro oni iris direkte al la vaporboato, kiu kondukos nin al la fama Skokloster. Dum la duhora vojaĝo oni havis bonan okazon por interkonatiĝi kaj refreŝigi malnovajn memorojn. Baldaŭ oni estis ĉe la celo, la fama, malnova kastelo de Skokloster, kies riĉaj kolektoj estis rigardataj sub gvidado de speciala cicerono. Interesa en plej alta grado estis tiu vizito. Irante tra la multaj ĉambroj de la malnova kastelo, ĉiuj plenaj de diversaj trezoroj; armiloj, pentraĵoj, mebloj kaj artaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo, ĉio kun sia historio, oni preskaŭ forgesis la nuntempon kaj sentis sin kvazaŭ vivante antaŭ du aŭ tri jarcentoj. Sed la tempo pasis, la rondiro estis finita kaj baldaŭ oni lasis la malgrandan insulon en »Mälaren» kaj »malrapidis» — ĉar la boato iris tre malrapide — al la Fyris-urbo.

Veninte tien nia unua zorgo estis tagmanĝi. En la agrabla manĝejo de »Gillet» ni trovis, kion ni bezonis. Post la tagmanĝo oni ekskurasis al la idilia »Grindstugan» kie kafo estis trinkata. Kaj poste, ĝojaj kaj kontentaj, oni iris por »rigardi la urbon». Kun la verda flageto levita oni grupe migris tra la stratoj. Kaj la internacia lingvo ree zumis en la urbo, kiu siatempe estis la centro de la ekkreskanta esperantomovado, kiu, dum la lingvo tie ĉi preskaŭ estas forgesita, faris tian grandan evoluon en la mondo.

Tute »senesperantista» la urbo tamen ankaŭ nun ne estas. Jam tri esperantistoj, unu post la alia plendis al la redakcio de »La Espero»,

ke »bedaŭrinde mi estas la sola esperantisto tie ĉi!»

Sed, al la temo! Mi ĉisupre provis priskribi kiel tiu eksterordinara esperantotago pasis. Kaj ĝi estis agrabla, tio estis la ĝenerala juĝo de la partoprenantoj. Esperanto ree montris sian eminentan povon kumigi kaj unuigi. Kaj vespere vojaĝante ĉiu al sia loko, oni portis kun si la memoron de bone pasigita tago.

Partoprenanto.



Esperantoagitado en Söderhamn.

Dum mia somera libertempo mi en la lastaj jaroj estis kutima viziti la svedan esperantotagon, sed tiun ĉi jaron la tempo de la tago malhelpis min ĉeesti.

Tamen mi kompreneble ne volis resti en »la ĉefurbo de la svedaj esperantistoj» — »kiel sinjoro G. H. Backman foje nomis Gefle» — kiam la libertempa semajno venis. Ne, mi vojaĝis — kaj mi direktis mian vojaĝon al urbo norde de Gefle, al Söderhamn. Kiel la esperantistoj eble jam scias, ne ekzistas klubo en Svedujo norde de Gefle. Tio kompreneble tial, ke la agitado en la norda parto de nia lando ĝis nun estis tiel malforta. Sed mi deziris vekti la dormantajn homojn.

Veninte al Söderhamn, mi unue serĉas inteligentan redakcion. Mi trovis tie la redakcian sekretarion, sinjoro Palm, kaj al li mi montris esperantaĵojn de ĉiuj specoj, kartojn de ĉiuj landoj k. t. p. Kaj kiam mi al li priparolas mian movadon, li tre miras pri ĝia disvastiĝo. La intereso por la afero estis tuj vekita. Li promesas enpresi artikolojn pri esperanto, kaj la rezulto de tiu permeso montris sin en »Söderhamns-Kuriren» la 13-an de aŭg., kiam ili presis mian artikolon »Världsspråket just nu» »La nuna situacio de la mondolingvo» kiu okupis unu kaj duonan kolonon.

Poste mi serĉis alian personon, kiun mi kredis esti interesata por nia movado. Li petis min viziti la kunsidon de la sobrega societo »Verdandi» la mardon la 3-an de aŭg. Mi en ilia kunsido priparolis la lingvodemandon. Sed la plej

bonan rezulton mi atingis en alia kunsido la 6-an de aug. Post kiam mi iom preparolis la demandojn kaj respondis kelkajn demandojn pri la afero, la kunsido difinis elekti kvar personojn por realigi fondadon de esp.-klubo en Söderhamn. En la komitato oni elektis la sinjorojn A. Andersson, F. Levander, A. Norden kaj J. L. Selin, kiuj laŭ sciigoj ricevitaj poste, laboregas por nia afero en tiu ĝis nun dormanta urbo. 25 personoj estas laŭ tiu sciigo jam anigitaj al la fondota klubo kaj al la kurso, kiu plej kredible baldaŭ komencos sub gvidado de persono, kiu promesis sufiĉe lerni la lingvon por povi instrui la aliajn. Ĝis la aŭtuno ili preparos esperantan ekspozicion. Jes, tia estas la rezulto de mia libertempa agitado en la milita somero 1915. Kaj nun mi en la nomo de la tuta esperantistaro volas deziri al la estontaj esperantistoj en Söderhamn la plej grandajn sukcesojn!

Einar Adamson.



Al la intelektuloj ĉiunaciaj.

La Konsilantaro de la Oficejo por Internacia Paco, kunveninta en Berne, la 6an kaj 7an de Januaro, 1915, decidis eldoni la sekvantan »Alvokon al la Intelektuloj Ĉiunaciaj.»

Dum naŭ monatoj antikva Eŭropo spertis ĉiujn teruregojn de senkompara Milito. La korpoj de la plej fortikaj junuloj de ĉiuj regionoj kie oni sin okupis energie pri aferoj industria kaj de civilizacio nun fariĝis nur amaso de ruinoj. Milionoj da homoj, kiuj antaŭ nelonge estis aktivaj kaj sanaj kaj feliĉe okupiĝis pri paca laboro fariĝis kaptitoj de la morto, malsano, kriplesco aŭ ili ankoraŭ lace penadas en mizero kaj malespero. Tiuj esperoj kiuj fierigis la Homaron en la komenco de la 20a jarcento malaperis — estas forgesitaj. Instigitaj de malamo kaj kolerego homoj pensas nur kiamaniere ili povas detrui tion kio hieraŭ ŝajnis esti nedifekteblaj monumentoj de senkompara epoko de progreso.

Kaj tamen — lumeto malproksima, necerta — espero ekaperas en tiu ĉi sanga kaj tragedia nokto. Venos tago kiam tiu ĉi malfeliĉo devas finiĝi, kiam la racio reaŭdiĝos kaj kiam la homaj konsciencoj revekigoj.

Ni ankoraŭ ne scias kiam venos tiu tago, sed, ke ĝi devas veni ni estas certaj. Ĉiam fidi pri tiu tago de liberigo eble estas pli grave kaj pli humane ol sanigi la vundojn de tiuj, kiuj nun suferas pro la Milito. Prepariĝi por tiu venonta tago en tiu ĉi tempo de ekscito kaj sango devus esti sankta devo.

Sur vin, scienculoj kaj kleruloj, sur vin, la intelektaj gvidistoj de la Homaro, kies devo estas alte teni la malfalditan standardon de civilizacio kaj ĝin flirtigi kiel viaj antaŭuloj ĝin flirtigis kun pli granda energio dum la tempoj de malfeliĉo kaj mallumo, sur vin falas tiu ĉi sankta devo, kun potenco al kiu homo malofte submetiĝis en la daŭro de la jarcentoj.

En la nuna momento homoj staras unu kontraŭ ilia, plenaj de venĝemo kaj malamo, havantaj unu solan deziron — senkomplete disŝiri unu la alian. Nekapablaj taksati la ligilojn kiuj unuigas ilin, ili persiste neas ilin. Sed vi, Levidoj de la Scienco kaj Arto, la edukistoj de la popoloj, esplorantoj kaj elpensantoj, vi scias ke ekzistas tiaj ligiloj, kaj ke tuj kiam malaperos tiu ĉi sanga iluzio de Milito nefleksebla leĝo instigos al la nunaj batalantoj serĉi unu la alian — trovi unu la alian.

Oni ne petas ke vi intervenu por fini la Militon aŭ devigu repaciĝon. Tion fari vi ne havas povon. La homaro povas eviti militojn sed kiam milito senkateniĝas ĝi tute ne havas povon subpremi aŭ limigi ĝin. Tamen vi povas resti nemakulitaj de la malamo. Vi povas vin deteni de juĝado kaj kulpigo, denunco kaj riproĉo. Eĉ se via koro superfluas silentu.

Se tamen, vi devas paroli, tiam penadu altigi tiun komunumon inter kiu vi pasigas vian vivon, en kies mezo vi laboris kaj kiu permesis al vi plene ellabori viajn sciencojn kaj arton. Ĉar venos tago kiam tiu ĉi komunumo reviviĝos. Kaj ĉiuj kiuj igis ĝin malestimata hontos. Evidu tiajn bedaŭrojn por vi mem kaj por via popolo. Restu fidelaj al la Idealo, por ke vi partoprenu en la laboro de reunuigo kiu vin atendos post la Milito. Estu kiel la ĉefŝtonoj de la ponto kiuj restas nedifektaj kaj ebligas reconstruon de la

interkomunikiloj spite penadojn ilin detrui.

Vi eraras pensante ke vi devas partopreni militon kiu nur estas deviga por la militistoj. La alta sento kiu igis vin fari tian paŝon estas komprenebla. Tamen vi devas vidi la danĝeron kiu kuŝas funde de tiu eraro, kaj ĝin forlasu. Por vi la Homaro devas esti pli grava ol la Nacioj, kaj vi pli bone servas la patrolandon servante la Homaron. En la mezo de haoso vi estas antaŭdifinitaj prepari la publikan kaj moralan ordon por la Tago de Paco.

En tiu tago via grava momento estos veninta. Tiam per viaj agoj kaj paroloj vi helpos resanigi la nuntempajn sangantajn vundojn.

Por la Oficejo de Internacia Paco
H. La Fontaine, Prezidanto
H. Golay, Sekretario

Berne, Januaro, 1915.



Renversita logiko.

Antaŭ nelonge, en Parizo, policano arestis vagulon kaj kondukis lin al la policejo. La vagulo ne parolis eĉ unu vorton france (li parolis nur germane) kaj la komisaro tute ne konis la germanan lingvon; li do venigis franca-germanan interpretiston por pridemandadi per li la arestiton.

— Kie vi naskiĝis? — demandigis la komisaro.

— En Parizo.

— En Parizo, vi do estas franco? —

— Ho ne, via sinjora moŝto, mi ne estas franco, mi estas germano.

— Sed, ĉar vi naskiĝis en Francujo, vi devas esti franco!

— Kial? Nu, se mi estus naskiĝinta en stalo, ĉu mi devus esti ĉevalo?

»Antaŭen Esperantistoj!«



Samideanoj!
Abonu "La Espero"!

La nova pacagado.

Resumo de artikolserio de R. Moe, la sekretario de la Norvega Nobel-a packomitato, Kristiania.

De Brynjulf Jhss. Klingenberg

III.

(Lasta artikolo.)

Plejnovtempe estas dogmigte, ke la kaŭzoj de ĉiuj internaciaj krizoj nepre estas el ekonomia speco.

Vere ekonomiaj motivoj ludis gravan rolon en la kolonia politiko, — sed kiel feliĉiganta pacdogmo estis tiu kompreno grandege troa.

Senantaŭjuĝaj studoj pri la deveno de la militoj kaj internaciaj konfliktoj montros la ekonomiajn motivojn kiel malĉefajn faktorojn, kiuj, nur kiam ili estis akordantaj kun la historia kaj nacia, imperialista kaj militara ekspanspolitiko, pligrandigis la kaŭzojn de la konfliktoj. Tio povas esti dirata pri la Boermilito kaj la marokanaj demandoj de 1905 kaj 1911.

La programo de N. A. O. R. deziras, ke la nova pacagado antaŭmetu la postulon pri politiko de la malfermita pordo. Kiam oni en mezo de la lasta jarcento parolis pri tiu ĉi politiko, tiam oni precipe pensis pri liberaj okazoj por fari komercajn aferojn. En la nuntempo estas tute ne necese aranĝi internacian pacadministracion por tiu kutimigo.

Se oni nur havas sufiĉan energion, monojn, kaj lokajn konojn, tiam tute nekonsidere al la nacieco tiuj ĉi ecoj estus uzotaj, supozite ke la naturaj kondiĉoj cetere ĉeestus. Alimaniere estas pri la metia vivteno de la fremdlandanoj, — pri la persona libereco de metia laborado, — speciale kiam tiu estas kunligita kun malfacilaj emigradtiloj, kiel ekzemple en Usono, kie estas gravaj malfacilaĵoj. Nur por la grandaj socioj de kapitalistoj, kiuj petas grandajn koncesiojn, la politiko de la malfermita pordo plie havas realan signifon sed laŭ la sperto sin aranĝos tiaj rilatoj sammaniere kiel en Eŭropo.

Evidente la ŝtato ne povus per ĝenerala traktato ĉiame valoronta malfermi ĉiujn kluzojn al kaj el la kolonia teritorio; tial oni certe komprenus, ke la pli praktike pensantaj politikistoj kaj financistoj nuntempe apenaŭ donus la grandan signifon

al tiu ĉi feliĉiganta principo de la malfermitaj pordoj; — multaj pacemuloj havas ofte mirindan amon al proporecie malplenaj ideoj.

Oni ne forgesu, ke la internacia pacproblemo estas popolpsike determinita.

Ĝia solvo dependas de multaj kaj kunmetite historiaj kaj naciaj kondiĉoj.

Precize en tiuj ĉi neraciaj sentmotivoj de grandege malfacila naturo kuŝas la profunda malfacileco.

Nun la mondo bezonas organizitan pacmovadon, kiu kalkulas kun tiuj malfacilaĵoj.

Oni atingis jam en Hago 1899 kaj 1907 tre sukcesan rezultaton per la unua provo por kunmeti vere internacian pacleĝaron. La daŭrigo ne forestu; sed estas tre bedaŭrinde, ke oni estas kompromitinta la Hagagadon, kunkuplante ĝin kun nematuraj projektoj.

Estas ankaŭ tre malsukcese, ke la priparolita agado por arbitraciaĵoj kaj aliaj pacinstitucioj apartenantaj sub la leĝaro de la paco estas farotaj sub la supozo, ke ili devige estu realizotaj per la mirakloplena estonta »Viena Kongreso«. En la nuna momento kaj la Haga tribunalo kaj la aliaj pacinstitucioj estas disrompitaĵoj. Bedaŭrinde ilia restoracio ne estas facila, kaj en la nuntempo ili ne donas solidan bazon por antaŭmeti interpopolrajtajn postulojn al militintaj grandŝtatoj.

Oni ankaŭ rimarkos, ke forte antaŭironta internacia agitado, speciale el la neŭtralaj landoj, povus esti malbonuzata kaj de la venkitaj ŝtatoj sentata kiel maljusteco flanke de la neŭtralaj ŝtatoj.

Mi plie havas la konvinkon, ke la kongreso por paco post kadukaj militoj ne povas doni bonajn pacjurajn dokumentojn por estonta paco; — tiajn oni ne imagis al si kiel fundamenton por la internacia pacagado de l' estonteco, — kaj fine: al la »Fiat pax! Pereat mundus!« (»fariĝu paco, pereu la mondo«). kiel signaldiro de la socialdemokratoj por la nova pacagado oni devus certe kontraŭiĝi, ĉar la konsekvencoj estus senfinaj kaj nekontroleblaj.

Ragnvald Moe

El »Tidens Tegn«, resume tradukita de
Brynjulf Jhss. Klingenberg.



Förlorat!

Den engelska »föreningen för förenklad stavning« har satt ut ett i ögonen fallande anslag vid sina lokaler mitt emot Brittish Museum. Anslaget lyder:

Förlorat.

£ 70,352,180

åriligen på att lära brittiska skolbarn att stava engelska.

Närmare upplysningar lämnas en trappa upp.

Miss C. Just, föreningens sekreterare, beräknar att den brittiske skolpojken i medeltal använder 2,320 timmar att lära sig stava. Den tyske skolpojken lär sig att stava sitt språk på 1,302 timmar. Esperantopojken, kunna vi tillägga, lär sig stava på ungefär en timme.

Vi esperantister, tillägger den engelska esperantotidning, varur detta är hämtat, skulle kunna gå ett steg längre, så här:

Förlorat.

12,000,000 kr.

om dagen, emedan världen ej lärt sig Esperanto.

Närmare upplysningar lämnas av varje esperantist.

Vilken ousäglig mängd av tårar, fiasor och pengar hade kunnat sparas, om folken som nu strida med varandra hade försökt att förstå varandra! När vi lära oss esperanto, låt oss göra det med det bestämda målet i ögonsikte, att vi måtte lära oss förstå andra människor av andra folkslag och finna i dem bröder och vänner.

»The Esperanto Monthly.»



Esperantos egen-skaper.

II.

I esperanto uttrycker den talande de tankar som formas i hans hjärna, i ord med en klar bestämd betydelse, och även om han uttrycker sina tankar medelst en ny, spontant bildad sammanställning av stamord

och ändelser, så talar han ändå icke blott ett felfritt esperanto, utan förstås även ögonblickligen av åhörarna. För att till fullo uppskatta vad detta innebär, är det nödvändigt att lära sig och använda språket; en liten eftertanke skall emellertid visa, att denna språkets böjlighet giver det en märkvärdigt hög grad av uttrycksfullhet och behag och gör det lika lämpligt för samtal och diskussioner, för skämt och allvar, för poesi och prosa.

Förklaringen till denna böjlighet hos esperanto ligger i beskaffenheten av språkets ordförråd. Detta består av ett begränsat antal ordstammar, mindre än i de flesta levande språk. En hastig jämförelse visar att t. ex. en esperanto-engelsk ordbok om 4000 ordstammar är till samma nytta som en svensk- eller tysk-engelsk om 20,000 ord. Och av dessa ordstammar användas en del, närmare bestämt ett trettiootal, som för- eller efterstavelser och häri ligger förklaringen till språkets nästan obegränsade möjligheter i fråga om ordbildning. Dr. Zamenhof förklarar på följande sätt den princip han följt: — »Jag ställde upp regler för bildningen av nya ord, och reducerade samtidigt till ett minimum det antal ord, som voro absolut nödvändiga att lära in, dock utan att beröva språket möjligheten, att bli ett rikt sådant. I stället gjorde jag det, tack vare möjligheten att av ett stamord bilda en hel mängd sammansättningar, i stånd att uttrycka varje tänkbar tankeskiftning, till det rikaste av de rika bland de nutida språken.»

Vända vi oss nu till stamordens härledning, så finna vi, att esperanto verkligen är internationellt. Det skulle vara svårt att konstruera ett språk, som i detta hänseende tog större hänsyn till Europas och Amerikas större nationer. Den övervägande delen av ordstammarna äro av romanskt ursprung, och en stor del av dem kännas lätt igen av personer som tala franska, italienska, spanska och även engelska eller liknande språk. Tyskar och andra germanska folk ha en stor lättnad genom ett betydande antal germanska rötter, under det ryssar, polacker och andra slaviska folk ha en fördel genom flera likheter i avseende på betoning och uttal i deras eget språk och esperanto.

La packongreso de la virinoj en Haag,

Aprilo 1915.

De B. J-hss Klingenberg.

I.

La ministroj por la eksteraj aferoj estas akceptintaj la multajn rezoluciojn.

Tiu diplomata dokumento ĉirkaŭas ŝtaton por politika mondreformomovado pri ĉio inter ĉielo kaj tero.

Ke »la flama frenezo de la milito» kaj »ke la virinoj plu ne povas sidi kun la manoj sur la genuoj» estas certe bona rızorto por la kongreso; sed la preparolita »venko de la prudento» por la kongresa laborado estis do malĝoja seniluziigo. —

Tiu ĉi virina packongreso sin ne distingas alimaniere ol la pli fruaj kongresoj kiujn oni uzis por disvastigi religie sektajn opiniojn, partipolitikajn demandojn pri senarmigo kaj politikajn rajtojn egalajn por virinoj kaj viroj k. t. p.

La interpopola paco kompreneble ne povas esti dependa de la cirkonstancoj, ĉu en la ŝtatoj la virinoj havas pli aŭ malpligrandajn, politikajn rajtojn aŭ ĉu la konduko de la eksteraj ŝtataferoj estas metita sub demokrata aŭ aristokrata kontrolo.

Estas necese por la agbezonantaj virinoj priskribi la interpopolan pacon per ĝiaj proprecoj, kaj la difino estus tia:

»Kiam inter leĝa kadro la burĝoj de la oficiale akceptitaj ŝtatoj propravole faros eble, ke fremdlandaj burĝoj laŭ ilia memvola elekto dum la ĉiutaga agado kaj konduto povus interrilati al la ŝtatanoj kaj sin reciproke okupi por plenumi siajn spiritajn aŭ materialajn bezonojn kontraŭ interkonsenta kompenso kaj kiam sub tiuj cirkonstancoj la leĝoj kaj la rilatoj reciproke sendangerigos la vivon kaj la posedaĵojn de unu por la alia, — tiam oni nomas tiun rilaton: Laborado dum interpopola paco.

Se tiu rilato ĉikaŭprenos ĉiujn ŝtatojn de nia mondo, tiam ĝi nomiĝos internacia.»

Tiu difino, — kiel sobra estas ne tiu kontraŭ la altiĝanta ondo de la virinaj rezolucioj?

Estas tuj evidente, ke la protekto de la interpopola paco nur principe estus ordigita per internacia popolarajto, kiu estos konservita per la burĝoj de la koncernaj ŝtatoj laŭ ĝiaj leĝoj, kaj kompreneble juĝo per la internacia juĝistaro ne povas esti iu militminaco kaj aŭ ne doni al iu ian rajton aŭ permeson ekpreni la uzadon de militrimedoj, — bone rimarkita por la kutimo de la paco.

La perdita paco en sia frua formo ne reale estus riparita post milito, — ĉar la semo de la malamo estas semita en la vivantaj gentoj.

Rezolucio no 5 pretendas »respekton por la nacieco».

La logika konsekvenco de tio ĉi estas, ke, se ŝtatasocio ne dezirus aŭ povus doni la necesan certecon por la vivo kaj la posedaĵoj de la fremdlandaj burĝoj dum ilia ĉeesto en la danĝera lando, tiam la fremduloj havas la devon foriri el tiu ĉi. —

Se tiu ĉi ne povas esti realigota, tiam ekstaras interpopola bataldemando, kiu eble postulos sian pacigon por la intereso de la paco, sed, kiam tiu ĉi pasigo estas kombinita kun plebiscito pri landforlasaĵoj kaj aŭtonomio, — tiu ĉi estas la konsekvenco de la estinta milito. — Tiu okazoj en la estonta justa konsekvenco de la atendata daŭra paco ne estos sin koncernigontaj. Tial oni prave ne antaŭmetus tian specon de diplomata procedo kiel programon por la interpopola pacagado.

Koncerne al la demokrata estraro kunmetita kaj de virinoj kaj viroj en kontrasto al aristokrata estraro sen aŭ kun virinoj, tiam la valoro de la ĉeestanta estraro por la interesoj de la paco devas esti la objekto por takso per spertaj diplomatoj. Tiu ĉi takso estos decidiga por la oportuna politiko.

Dum la realeco de la afero estas, ke la politiko pri la eksterlandaj aferoj ne devos esti kontrolita por la interesoj de la demokratio sed sufiĉe mirinde tute nur por la interesoj de la interpopola paco — kaj certe demokratio kaj paco bedaŭrinde tute ne estas adekvataj esprimoj.

Se la ŝtatasocio havas leĝojn kaj aŭtoritatojn donantajn la demanditan certecon, tiam estas tute egale kiun politikan koloron havas la estraro. Ĉu oni ne akceptas »venkon de la prudento», se oni estus konservinta tiun veron, ke demokratio kaj aristokratio estas komuna sekso de la plej pura akvo? La virinoj tiam oficiale akceptus ageman »de-



mokratan virsekssistemon» ĝis oni havas korektan komprenon pri la supozita »demokrata virina sekssistemo».

Ankaŭ la motivo por demandi la demokratian kontrolon, nome, ke la milito ne estas kaŭzita per la grandaj masoj de la popoloj, kiuj ne deziras ĝin, sed per la grupoj, kiuj reprezentas specialajn interesojn, ne estas korekta, — kion oni povas kompreni tute per tiu cirkonstanco, ke estas ĉiam la popolmaso mem, kiu realigas la militon.

La prudento de la virinoj ankaŭ ne estas venkinta en la eldiro pri »la rajto de la konkero». Kiam la virinoj ne ankoraŭ estas povintaj la kompletan forigon de la milito, — kion ĉiuj virinoj de nia mondo, eĉ se ili iros antaŭen en sia plena reala potenco ne povus, — ne pli ol ĉiuj reĝoj en vico povas meti foliojn sur urtikon ekster tiuj ĉi, kiujn la naturo konstruos, — oni estos vipe devigita akcepti »la rajton de la konkero». Se ne, — oni vivus en senĉesa milito. Kiam la pacamikoj nun per la antaŭmeto de tia propono denove faras senefikajn provojn por la »eterna forigo de la milito», tiam tiu ĉi konduto ŝajnus tute tragikomika post la kolosa bankroto, kiu trafis la pacagadon. Ankaŭ tiu ĉi eldiro pri la rajto de la konkero estas tre infanaĉa dum la nuna starpunkto de la milito.

La antipatio de diversaj militantaj ŝtatoj kontraŭ libervola interpacigo kaj arbitracio montras al la dezirindeco, ke la virinoj sukcesus trovi la plej sukcesan formon por tiu maniero. Dume rimarku, ke la reala fundamento devus esti, ke ambaŭ la partioj plendos al la arbitracia juĝistaro el la amo al la interpola paco kaj ĝiaj intereso kaj ne el la timo por la milito.

Tiu lasta motivo ofte nur kondukos al la arbitracia juĝo por absolute malhelpi la militon sen atento al la justeco pri la ofendo, kiu estis farita kontraŭ tiu ĉi en tiuj okazoj.

Ĉiu kruda malsaĝulo povas rabi kaj batali, sed por la arbitracio estas bezonata multe da kultura pripenseco aganta sur tiu fundamento, ke la justeco estas tute senpartie klara antaŭmilita kaj plenumigita. La ĝenerala kompreno de la virinoj pri la kultura valoro de la milito estos frakasante indiferenta, sed estas dume tre dezerinde ke ili konu nian sobran difinon pri la interpola paco, por ke la granda publiko povu kompreni la juĝon kaj kontroli ke la justeco reale estas pravigita.

(Daŭr.)

La Heredaĵo de Gustav Vasa.

(El Novaj svedaj sortoj de August Strindberg.)

(Daŭr.)

— Ĉu la viro mortis? estis la unua demando de la reĝo.

— Al via servo, via moŝto.

— Mi ne amas sangoverŝon kaj ankoraŭ malpli senpensan parolon... Tamen la unua pafokazis; kion vi nun volas fari?

— Ni devas okupi la dukon per traktado.

— Okupi? Vi opinias trompan faradon por havi per ĝi gajnojn? Estas senhonto, kaj tion mi ne volas; mi jam estas logita subskribi necertajn traktatojn, tiun ĉi fojon mi kontraŭe volas provi pacigon, amikigon kaj firmajn interkonsentojn — ĉu miaj trupoj sukcesas alveni aŭ ne.

— Iru nun venigi Johan Gyllenstjerna'n, petu lin ĉi tien por ke ni konsilu.

La ĉambelano foriris, kaj la gefratoj restis solaj.

— Sigismund, komencis la princino; vi ne kredu ion, ion malbonan, kvankam aspektas tiel...

La reĝo rigardegis kvazaŭ li volus forigi ĉiun penson pri la amindumo de aliaj, kio efikis je li malpurige.

— Mi kredas nenion, mia fratino, kaj la plej intiman oni bone kaŝu al si kaj aliajn, ke ĝi ne malsanktiĝu... Vian intermikson en la edziĝo de Gyllenstjerna kaj Siri Brahe mi malaprobas; vi ja vidis la sekvojn kiel koran aferon oni igis en la parlamenton — — — devas esti la severega duko kiu faris tion... Nun mi ne volas havi scion pri tio plu aŭ ion alian...

Ĉambelano rompis la turmentigan al ambaŭ interparolon, anoncante la alvenon de sendito de la duko.

La viro, kiu nun envenis, apartenis al la burĝa skribista tipo de l' nova tempo, kiu postsekvis la kancelierojn de l' malnovaj tempoj. El nenobela deveno ordinare, ĉar la sinjoroj ankoraŭ preferis la glavon pli ol la plumon, tiuj sekretarioj ofte estis studentaj ĉe eksterlandaj universitatoj. Ĉe reĝo Gustav Vasa ili estis nomataj Norman kaj Pyhy, ĉe Erik XIVa: Göran Persson kaj Mårten Helsing; ĉe Johan IIIa: Rasmus Ludvigson kaj Johan Henrikson; ĉe duko Karl: Erik Olofsson kaj — tiu kiu nun envenis en Stegeborg kiel sendito de la duko.

Sigismund okuladis la donitan al li rajtigan dokumenton, rigardis forte kaj akre la negravan eksterajn de la sendito kaj la malmulte simpatiigan vizaĝon lian.

— Tio ĉi do estas Erik Jöransson, la sekretario, kie estas la senditoj?

La filo de Jöran Persson serĉis respondon, ĉar la fiera kondutmaniero de la reĝo konfuzis lin.

— La senditoj?

— Jes, mi ne traktas kun subuloj sed nur kun regulaj aŭ ekstraordinaraj senditoj, la reĝo respondis.

La regnestro min sendis, tio estas ĉio, kion mi povas diri...

— La duko sendas siajn sekretariojn en ĉiuj okazoj, eĉ por aŭskulti el ĉerizarboj; sed mi sendos al li la holandan kaj la anglan ambasadorojn, tuj kiam ili estos alvenintaj kun la ŝipoj, por trakti kun la duko, kaj kiel ilia helpanto akompanos la grafo Edvard de Baden; volu diri tion al via sinjoro.

La malbonveninta sekretario ne ŝajnis mirigita, kaj ankaŭ ne ofendita per tiu akcepto; kontraŭe brilis kontento el liaj okuloj, ĉar lia misio prosperiĝis per la tri gravaj sciigoj kiujn li ricevis: ke la spionajo estis eltrovita, ke eksterlandaj ambasadoroj akompanis la ŝiparon kaj ke ĝi estis atendata, sed ankoraŭ ne alvenis.

Li pro tio post dusenca komplimento kaj nur elparolante esperon pri la reciproka kontentigo de la pritraktoj forlasis Stegeborg'on.

* * *

Dum dek-kvar tagoj la senditoj faris proponojn al Sigismund kaj al la duko sen ia rezultato. Sed intertempe la kvin mil soldatoj de la reĝo kolektiĝis ĉe Stegeborg, dum la duko starigis la siajn apud Linköping. La pozicio de Sigismund estis tre favora ĉar la kavalerioj de Västergötland kaj Småland kunigis sin sub liaj standardoj kaj la ĉefkomandon havis Johan Gyllenstjerna kaj Gustav Banér.

La tempo de l' decidigo alproksimiĝis; la duko sendis jungaĵon kun du trumpetistoj al Stegeborg por transdoni leteron, je kiu respondo estis postulata en du horoj. Sigismund trovis tion ofendigan kaj lasis aresti la sendulojn. La duko perdis ĉiun pripenson kaj antaŭeniris kun siaj trupoj.

Estis nebula aŭtuna mateno, Sigismund staris rigardante tra la tura fenestro la belan pejzaĝon, kiu ŝajne estis volvita en vualo de plej

blanka neĝo. Sed kvazaŭ per unu bato ekstarigis tuta arbaro da brilantaj pintoj tra la blankaĵo, tuj poste montriĝis tuta svarmo da plumfaskoj simile al multkoloraj akvobirdoj, kaj ĉevalkapoj moviĝis... Fulmo rompis la nebulon, kaj baldaŭ tondris la kanonoj de la dudekkvar ŝipoj de l' reĝo, kiuj ankris sur la golfo. La nebulo estis disiĝinta de la pafado, kaj Sigismund vidis ke la popolo de la duko estas ĉirkaŭata de la polaj kavaleristoj kaj senescepte batitaj la popolo de la duko kovris la kampon.

La venko estis jam fakto; kiam Sigismund kortuŝiĝis de la subtilaj sentoj kiuj plej ofte kaŭzis al li lian malfeliĉon. Li vidis la onklon, la plej juna filo de Gustav Vasa, estis samlandanoj kiuj falis mortintaj sur la verdaj herbajoj kaj inter la estroj de Sigismund kaj duko Karl sin trovis proksimaj parencoj. Pro tio li finigis la batalon kaj sendis du princojn proponi al la duko pacigon kaj amikigon. Karl, kiu ne alkutimiĝis al grandanimeco, fariĝis ekscitita volis eliri el la regno kaj forlasi ĉion; sed tuj poste li hardiĝis denove, kiam la komencitaj traktoj estis senrezultaj. Dum Sigismund iris al Linköping por renkonti sian onklon kiel amikon kaj parencon, tiu faris kontraŭmoven, iris al Stegeborg, kiun li arme okupis kaj kies havaĵojn li forrabis, prenis la reĝan ŝiparon, kiun oni maltaŭgigis.

Tamen la malvenko de la duko estis sciigata tra la tuta regno, kaj la plejmulto el liaj amikoj kaj anoj defalis de li kaj turnis sin al Sigismund. Tiu estis nun ĉe la kastelo de Linköping, post mallonga vizito en la monaĥejo de Vadstena, kaj kiam li sciigis pri la rompo de la interpaco de la duko, li tediĝis al ĉio. Sed li ne longe havis okazon mediti la mizeraĵojn de la vivo, ĉar la duko venis kun siaj soldatoj. Kaj ree estis mateno, kiam la naturo tiris sian blankan vualon super la abomenaĵo de parencoj mortigantaj unu la alian. La batalon oni ankaŭ kondukis senforte ambaŭflanke kaj scenojn de rekonigo oni vidis tra la matena mebulado. Anders Lennartson kun la duka kavalerio renkontis Göran Bosse kun la reĝa:

— Frato, ĉu ni nun renkontiĝas kiel malamikoj! Posse salutis sian bonan amikon.

(Daŭr.)



Libroj kaj gazetoj.

Vegetarano, organo de la Vegetara Ligo Esperantista, aperigis unuan numeron de la dua jarkolekto. Ĝi kuntiras el ĉiuj landoj la plej bonajn observojn kaj konsilojn pri la vegetaraj vivprincipoj kaj estas bone redaktata de Maria von Rees, Bemurde Weerd O. Z. 32, Utrecht, Holando.

Sekr. — Kasisto: Rudolf Rajci, Rudapest II, Heltaj F.-u. 26 IV-4, Hungarujo.

Naciaj sekretarioj:

por Britujo: M. C. Butler, 18 Leigh Rd., Highbury, London N.;

por Francujo: Cécile Royer, 14 rue des Carmes, Paris V.;

por Germanujo: Hedwig Kirbach, Joh. Georgstr. 7 Berlin-Halensee;

por Hispanujo: Paul Linarès, H-to San Basilio, Córdoba;

por Skandinavujo: K. A. Karlstin, Holberg, Glommerstråk, Norrland;

por Holando: J. T. van Brussel, Bilde, dijkstraat 7 rood, Haarlem;

por Svisujo: Anna Šarapov, Campagne Birucoff, Onex apud Genève.

K. A. K.

Iom pri la plibonigo de l' mondo.

Originalo de H. Salokannel. Aparta preso de »La Internacia Abstinenta Observanto«. Eldonejo: G. Brockhof, Bomlitz, Hannover, 1914. 16 p. Prezo 0:100 Sm. La aŭtoro pritraktas du gravajn demandojn: »La kontraŭalkoholismo« kaj »La seksa pureco«. Ĉu ne estas necese, ke la mondo devas esti plibonigata? Aĉetu kaj legu serioze kaj atente ĉi tiun broŝureton!

H. B.



La Esperos garanti-fond.

Tecknade andelar:

Trpt. 395: —

B. J. Klingenberg, Kristiania 10: —

Ernfrid Eriksson, Idkerberg 5: —

Summa Kr. 410: —

Gävle den 28/8 1915.

Gävle Esperantoförening.



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 7 sept. kl. 8 e. m. å kafé D' Angletterre. Efter mötet samkväm.

Konversationskurs, eller, om vädret tillåter, utflykt i stadens omgivningar, äger rum varje söndag kl. 1/2 11 f. m. Samling vid kafé Esperanto. Obs! För alla medlemmar.

Föreningens **bibliotek** är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.

Äctehla elkonstruata akvoforto

en la okcidenta Norvegujo preskaŭ unu tagvojaĝon pli norde ol Bergen, kun grundo por estonta fabrikejo apud glaci-libera haveno konvena por la plej profunda iro de la ŝipo al kajo estas montrata ĉe mia kontoro. La prezo estas por uzo tagon kaj nokton po jaro 30 — tridek — kr. skandinavaj po H. P. (75 ^{kgm.}/_{sek.}) aŭ 40,80 kr.s. po 1000 watt'oj. La unuaj 30000 H. P. havigeblaj post 2 jaroj de la tago por subskribo de la kontrakto, kaj plie 30000, se mendotaj, post la plej proksimaj 2 jaroj.

Brynjulf J-hss Klingenberg's Patentkontoro
Prof. Dahls Gate 18 II, Kristiania, Norge.

Naskiĝo:

Nia filo **Ernst Valfrid**.

Geffe la 26 aug. 1915.

Sandra kaj **Georg W. Wahlund**.

Korespondado.

Francujo. — S-ro Louis Prévost, 73 Bard de Champigny, La Varenne St. Hilaire (Seine), deziras interŝanĝadi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj precipe en Svedujo, Norvegujo kaj Islando.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS
Axel Lidholm
Drottninggatan 30 -- GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe
FRANS A. OLSON
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

"LA ESPERO"
Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.
Lösnummer av tidningen kunna för spridning i propagandasyfte erhållas gratis av intresserade.
Tillskriv *La Esperos expedition, Gävle.*

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen
GEFLE
REKOMMENDERAS!

Glöm ej!
Café "Esperanto"
under sommarmånaderna.

SKODON
Största sortiment hos
A. M. Zimmerman & C:o

C. J. LINDH
BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE
Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.
RIKSTELEFON 1697.

ESPERANTISTER!
Köp och drick den verkligt goda njutnings- och sällskapsdrycken
ESPERANTO PUNĈO
Alkoholfri.
REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.



LA NOVA TESTAMENTO
LEDA BINDO
Kr. 2:50 (+ porto 0:30 kr.)
»La Esperos» Expedition,
GEFLE

Carl Larssons
FOTOGRAFIATELIER
NYGATAN 34
Rekommenderas!
TELEFON 357

La Espero

utgives av Gefle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.
Prenumerationspris Kr. 1:20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, **Gefle**, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Wickmans Kappaffär
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE
Vid Rådhusplanaden.
Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.
RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 1628.
Faras pligrandigoin laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

N. Lundgren
GEFLE - Interurba tel. 151
Kamentuboj por fabrikoj.
Pli ol 800 konstruitaj.
Riparoj dum uzado.
Fulmkonduktiloj estas muntataj.
Propra brikejo en Upsala.
Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.
Argentā medalo — en Stockholm 1897
» » » Gefle 1901
» » » Norrköping 1906



E. Liljemarks
Cigarr- och Tobakshandel
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26
rekommenderas!
Prima varor till billigaste priser.

Från "La Esperos" Expedition, Gefle,
kan rekvideras:
Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av
G. H. Backman 1: — + porto 0:10
Lärobok i Esperanto av
P. Nylén..... 1: — + » 0:12
Lärobok i Esperanto av
Carl Ohlsson 0:50 + » 0:08
(Alla med Esp.-svensk ordlista)
Esperantospråklära av
O. W. Hjærtstätt ... 0:40 + porto 0:08
Esp.-svensk o. Svensk-
esp. ordbok av Hjært-
stätt 0:60 + » 0:08
Svensk-esp. ordbok av
E. L-son Finn 1:50 + » 0:12

Unua Legolibro av Dr.
Kabe 1:60 + » 0:12
Nova Testamento (mjukt
band) 2:50 + » 0:30

Sveda Kantaro, kun me-
lodioj 0:35 + » 0:08
Esperantista Kantaro... 0:75 + » 0:04
» La Espero » himno espe-
rantista, med musik 0:60 + » 0:04
D:o d:o, propagandablad 0:05 + » 0:04

Esperantostjärnor 0:75 + » 0:10
D:o, (officiella, för med-
lemmar av U. E. A.) 1: — + » 0:10
D:o, (miniatur) 0:35 + » 0:10
Esperantobordsflaggor 2:40 + » 0:30
D:o (något enklare) 1:75 + » 0:30
D:o (mindre) 0:85 + » 0:30
Esperantoflagga 0:50 + » 0:08
D:o (miniatur) 0:15 + » 0:04
Reklammärken, 25 st. 0:45 + » 0:04

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper +
25 kuvert, damf. 1:50
" d:o, d:o, herrformat 1:65
Esperantocopiepennor, 30 öre st., 3 — kr. dussin
(hårda eller lösa).
Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1 — kr. duss.
(hårda eller lösa).
Allt franco.
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**